BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

CGC Nº
00406 504/0001-06

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

SET/OUT/1983 BOLETIM INFORMATIVO Nº 79

## LA KONSILANTARO ATENDAS VIN EN OLINDA

Olinda kaj Recife gastigos ĉi-jare, de la 12-a ĝis la 15-a de novembro, la IV-Kongreson de nia Organizaĵo, realigota sub registara aŭspicio kaj kunrespondeco de Pernambuka Esperanto-Asocio.

Ekde 1980, Brazila Konsilantaro de Esperanto havis okazon kunvenigi siajn anojn en Juiz de Fora-MG, São Paulo-SP kaj Brazilja-DF, en enventoj kie ankaŭ ĉeestis movadanoj ne ligitaj al BKE venintaj el la plej diversaj landpartoj, de la sudo ĝis la nordo. Espereble, la samo okazos koncerne la IV-an Kongreson nun en preparo, kies aliĝnombro ĝis antaŭ anu monato estis vere kontentiga.

Al la ĝenerala publiko, oni klarigu ke tiaj kongresoj, krom pritrakti privatajn aferojn en tutnacia asembleo de BKE-anaro, havas ankaŭ la celon veki la atenton de la regiona esperantistaro pri gravaj solvendaj problemoj de la E-movado en nia lando. Ĝuste pro tio, vi konstatos en la ĝenerala kongresa programo la rezervon de pluraj horoj por debatprelegoj pri, ekzemple: instruado de Esperanto en universitatoj kaj lernejoj, agado de la Nacia Esperanto-Komisiono, strukturo de la delegita reto de UEA en Brazilo, financa rezulto de la 66-a UK, filozofio kaj Esperanto, la arto en la E-Movado ktp.

Laŭ nia internacia sperto, la jarkunvenoj de BKE lastatempe, same kiel la grandiozaj seminarioj de KKE, pro amasa partopreno, serioza temaro, artaj programeroj, ekumena diservo kaj kultura lingva karaktero, estas ja pli grava kaj pli altnivela ol multaj Esperanto-kongresoj fare de dekoj da evoluintaj landoj en la terglobo.

Flanke de tiuj aspektoj kaj konstatoj, oni ne forgesu, ke la IV-a BKE-Kongreso ebligos al vi eksterordinarajn momentojn de ĝojo, kunfratiĝo kaj de kultura spertiĝo, fronte al la historio, naturbelaĵoj kaj arkitekturarto de Olinda, nuntempe oficiale rekonata kiel kultura heredaĵo de la homaro.

Ĉu ni povos kalkuli je via ĉeesto en Olinda? Eĉ se vi ne povos vojaĝi tien, sendu vian aliĝkotizon por prestiĝi la eventon kaj finance helpi la klopodojn de nia Organizaĵo, de la Loka Organiza Komitato kaj de Pernambuka Esperanto-Asocio. Koran dankon!

Carlos A.S.da Cunha.
Prezidanto

## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

**HONORA PREZIDANTO**
Francisco de Souza Almada - Av. Bernardino de Campos, 624 ap. 72, BR 11100 - Santos - SP

**Estraro**

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo-SP

**Vicprezidanto:** Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

**Informa Bulteno**
Dumonata Oficiala Organo de la Asocio
Jarabono Cr$ 1.200,00
Asociaj membroj ricevas ĝin senpage

**RESPONDECAJ DIREKTOROJ**
Carlos A.S. Cunha (ĉefredaktoro), Nelson P. Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

## ĈIO PRI LA IV-a BKE KONGRESO

**KONGRESPERIODO:** 12/15 novembro 1983, en Recife Kaj Olinda.
**KONGRESA TEMO:** Esperanto en Universitatoj kaj Lernejoj.
**HONORA KOMITATO (INVITITOJ):** Roberto Magalhães Melo, guberniestro de Pernambuko; José Lins de Albuquerque, federacia senatano; Freitas Nobre, federacia deputito; José Arnaldo Amaral, urbestro de Olinda; Pe. Antonio Geraldo Rosa SJ, rektoro de katolika Universitato de Pernambuko; Barreto Guimarães, direktoro de la Oficiala Eldona Kompanio de Pernambuko; Francisco S. Almada, honora Prezidanto de BKE; Fernando José Galvão Marinho, Prezidanto de BEL: Braz Cosenza, Prezidanto de KKE.
**BKE-ESTRARO:** Carlos A. S. da Cunha, prezidanto; Nelson Pereira de Souza, vicprezidanto; José Carlos Dirini Ramos, financa direktoro; Leda da Silva Gama, sekretario.
**LOKA ORGANIZA KOMITATO:** Prof. J.M. Mabesoone, prezidanto; D-ro Geraldo Pires Sitônio, vicprezidanto; Amaro Pinangé Soares, sekretario kaj Inĝ.Severino Nunes da Costa, **kasisto.**
**KONGRESEJOJ:** Sidejo de Pernambuka Esperanto-Asocio, Rua Siqueira Campos 279, ĉambro 905, Ed.Brasília, Recife (En 12-11-83, akcepto kaj disdono de materialo, de la 12:00 ĝis la 18:00 horoj); Aŭditorio CELPE, Av. João de Barros, Recife (Oficiala Malfermo, en 12-11-83, je la 20-00 horoj); Katolika Universitato de Pernambuko, enirejo Rua do Príncipe, Recife (Prelego k diskuto pri kongresa temo, en 13-11-83, ekde la 9:30 horoj kaj en 14-11-83, ĝeneralaj prelegoj, la tutan tagon; Federação Espírita Pernambucana, Av. João de Barros, Recife, en 13-11-83, spiritisma kunveno, de la 16:30 ĝis la 17:30; Centro de Arte Popular, Praça do Carmo, Olinda (En 13-11-83, arta kaj kultura vespero, de la 20:00 ĝis la 23:00; Olinda Praia Club, Olinda (En 15-11-83, adiaŭa tagmanĝo kaj oficiala fermo de la kongreso, ekde la 12:00 horoj).
**PRELEGONTOJ KAJ TEMOJ:** IVON BARBOSA, el Bauru-SP, UEA-Ĉefdelegito, parolos pri "UEA kaj la delegita reto en Brazilo kaj en la mondo"; Prof. EVALDO PAULI, el Florianópolis-SC, profesoro pri Filozofio kaj prezidanto de Filozofia Asocio Tutmonda, Frarcujo.Temo: "Scienco Filozofia kaj Esperanto"; Prof. WALTER FRANCINI, el São Paulo-SP, verkisto, advokato, estrarano pri kulturaj aferoj de BKE. Temo: "Dudek juveloj en la Esperantista Literaturo"; S-ino MARIA ALMADA, el SantosSP, multjara redaktorino de tiu ĉi Bulteno, fakdelegito de UEA kaj vicprezidanto de Universala Artista Ligo de Esperantistoj, prelegos pri "Arto en la Esperanto-Movado"; Prof. PAULO AMORIM CARDOSO, verkisto, UEA-delegito kaj universitata profesoro, prelegos pri "Logozofio, nova maniero senti kaj koncepti la vivon"; D-ro CÉSAR BARROS LEAL, el Fortaleza, kun la temo "Falsaj Amikoj"; D-ro JOSÉ LUIZ FERREIRA, Prezidanto de BEJO, el São Paulo, defendos temon ligitan al junulara movado; CARLOS A.S. CUNHA, ekonomiisto, nuna prezidanto de BKE, prezentos reporton pri la "Financa rezulto de la 66-a UK en Brazilija"; Prof. NELSON P. SOUZA, UEA-vicdelegito, vicprezidanto de BKE, prelegos pri "Spiritismo"; kaj esperebla, D-ro VICTOR SADLER, kiu ankoraŭ ne konfirmis sian ĉeeston.
**DISERVOJ :** Katolika meso, la 13-an novembro, je la 08:00 horoj, predikos Pastro Barros Leal; Spiritisma Kunveno, en la sama tago, de la 16:30/17:30 horoj; Protestanta kunveno, la 14-an de novembro, je la 20:00 horoj.
**EKSKURSO AL OLINDA:** Duontaga ekskurso po Cr$ 2.000,00 ĉiu bileto, antaŭmendebla ĉe la loka Organiza Komitato.
**ADIAŬA TAGMANĜO:** Fazeolaĵo je pernambuka maniero po Cr$ 2.500,00, ankaŭ antaŭmendebla ĉe LOK.
HOTELOJ: Pluraj diversstelaj kategorioj, laŭ

cirkulero de LOK, kiu ne plu akceptas mendojn post la 25-a de oktobro.
**LOĜADO SENPAGA:** La kongreso disponas pri reduktita nombro de senpagaj lokoj por tranoktadon speciale destinataj al studentoj kaj aliaj gejunuloj, kaj al karavanoj kiuj venos per propra aŭtobuso. Interesatoj bv.kontakti rekte la Organizan Komisionon.
**UTILAJ TELEFONOJ:** En Recife, post regiona antaŭnumero 081: Prof. Mabesoone, 221-5670; Pinangé, 251-1056 kaj D-ro Sitônio, 231-3491.

## HELPINDA STUDPROJEKTO DE PATRICK PETIOT

Por la jaro 1987-a, la juna poligloto Patrick Petiot (Caixa Postal 96920 - BR 28.600 - Nova Friburgo - RJ) sin proponis kolekti materialon kaj fari studon por prezenti al UNESKO verkaĵon, kiu povos atesti la realan utilon kaj forton de Esperanto en la kampo de komunikado. Temas la projekto, en la unua fazo, pri kolektado de fotografaĵoj pri ŝildoj koncernantaj al "sano" kaj "higieno", kun la respektivaj simboloj. Kial tia studado? "Ĉar - klarigas Petiot en sia cirkulero de 26-08-83 - ne ekzistas vida internacia kodo, kiu ebligas la turistojn trovi kuraciston, apotekon, gastejon, muzeon . . . kiam ili troviĝas en malsamkultura lando. Komunaj simboloj en Eŭropo (tiel kiel krucoj, la A gotikaj, la serpentsceptroj de la Dio Merkuro, kiuj identigas la apotekon) ne havas ian signifon orientlande. Do, ekzistas intereso kolekti, klasigi arojn de fotaĵoj por montri ekzemplerojn de kulturoj popularaj, regionaj, tradiciaj el la tuta mondo kaj klopodi stabligi internacian vidan kodon rilate al tio, pri kio pleje interesiĝas la turistoj".

La esperantistaro povas helpi la junulon Petiot, sendante al li fotojn pri ŝildojn rilatajn al:

- Kuracistoj, dentistoj, veterinaroj, apotekoj . . .
- Urĝaj helpoj, hospitaloj . . .
- Optikoj, aparatoj por surdeco . . .
- Popularaj medicino kaj apoteko, banejoj, masaĝoj . . .
- Hartondejoj, higienaj materialoj . . .

Dorsflanke de la fotoj bv. fari klarigon, en Esperanto, pri nomo de la lando, urbo, lingvo tie parolata, speco de la anoncata sana aŭ higiena aktivaĵo kaj, kompreneble, informi la nomon kaj adreson de la sendinto.

## UNUIĜO

La Redakcio ricevis de Prof-ro Euclydes Geraldis de Carvalho, inda prezidanto de "Sociedade Bauruense de Esperanto", longan artikolon pri la unuiĝo de la Brazila Esperantista Movado, per kunfandiĝo de BEL, KKE kaj BKE, surbaze de administra strukturo kies ĉefaj punktoj estas:

*"1- La unuiĝo postulos, dekomence, la faradon de tre saĝa statuto, kiu enhavu la plej bonajn priskribojn por ke oni atingu la celojn de la movado.*

*2- La Organizaĵo, nature, konsistos el la necesaj regaj organoj, sed el ili ni starigas du: la Konsultiĝa-Decida konsilantaro (KDK) kaj la Rega Estrato (RE).*

*3- KDK havos superajn povojn rilate al RE.*

*4- KDK konistos el unu reprezentanto el ĉiu esperantista ŝtata organizaĵo enskribita en la nacia Organizaĵo.*

*4.1 - Krom tiuj representantoj, en la provizoraj statutaj priskriboj, devos esti dirite, ke povos aparteni al KDK, dumvive, ĉiuj personoj kiuj estas aŭ estis direktoroj de iu ajn el la tri naciaj oerganizaĵoj.*

*5- RE estos elektita de KDK. Por RE povos esti elektita iu ajn esperantisto, escepte tiuj kiuj estas aŭ estis direktoroj de iu ajn el la tri naciaj organizaĵoj.*

*Rimarkoj: Tio priskribita en la nº 4.1 ebligas, ke ĉiuj aktualaj kaj antikvaj direktoroj de la tri naciaj organizaĵoj povu konsistigi la maksiman organon de la Organizaĵo. Kaj tio priskribita en la nº 5 malebligas, ke la rega direktoraro de la Organizaĵo havu, en sia fronto, elementon, aktuale aŭ antaŭe, ligitan al iu ajn el la tri naciaj organizaĵoj".*

La sugeston, kune kun eventualaj aliaj opinioj pri la temo ni transdonos al la Nacia Esperanto-Komisiono (kupola integriĝo de BEL, KKE kaj BKE), kiu estas la organo kreita de tutnacia asembleo okazinta kadre de la XV-a Seminario de Esperanto, en 24-07-82, kun la celo administri la ĝeneralajn interesojn de la E-Movado en nia lando.



# BRAZILAJ NOVAJOJ

## FEDERACIA DISTRIKTO

● Aliĝo aŭ realiĝo al BKE por 1984 fariĝos 40% pli multkosta ol la nunjara tarifo de Cr$... 3.000,00. Tamen, la tarifo restos senŝanĝe, kondiĉe ke la interesito anticipu la pagon ĝis 31-12-83.

● En la urbocentro de Brazilja, nia sidejo daŭras je la dispono de kiu ajn E-grupo, por tie okazigi senpage kunsidojn, ekspoziciojn, prelegojn, esperanto-kursojn ktp. Sufiĉas nur pruntpreni la ŝlosilon kaj agi.

● Post longa stagnado de pli ol unu jaro kaj duono, vekiĝas la Associação Brasiliense de Esperanto, kies nova prezidanto estas S-ino Néia Lúcia Souza, sendube unu el la plej kompetentaj kaj repondecaj E-gvidantinoj ĵus alveninta el la junulara movado.Korespondadreso: SQS 306, Bloco A, Ap. 101, BR 70.353 - Brasília-DF.

## BAHIA

● Fondiĝis Societo Esperanto de Salvador (C. Postal 2550 Ag.Cid.Alta - 40000 - Salvador), kies unua Estraro estas: Marcelo F.C.Rocha - Prez; Ronilson M. Mota - Vic; Henrique S.B. Knoedt - Sek; Kleber O. Souza - Kas; kaj Leopoldo H. Knoedt, José Saraiva Matos kaj Manoel Borges dos Santos - Konsilantoj.

## MINAS GERAIS

● Nova grupo ekaperas en tiu ŝtato, la ĵus fondita Ipatinga Esperanta Frateco-Grupo (Rua Vasco Ataíde 74, Bom Retiro Leste, BR 35160-Ipatinga-MG).

● S-ano Evandro Silva Martins (Rua Miguel de Stefani 298 - J. Induberaba, BR 38100 - Uberaba) anoncas ke komenciĝis E-kurso ĉe Faculdades Integradas de Uberaba (Caixa Postal 451), petante ke oni sendu al ties direktoro, D-ro Marcelo Palmério, gratulleterojn kaj propagandilojn.

● Paulo R. Santos, unu el la plej agemaj membroj de la organiza komitato de la E-Seminario en Ouro Preto, ĵus transloĝiĝis al Divinópolis, kie li jam faris la unuajn paŝojn cele al disvastigo de la internacia lingvo (Av. 7 de Setembro, 170 - Centro, BR 35500 - Divinópolis).

● La vicdirektoro de Instituto pri Scienco kaj Beletro de la Federacia Universitato de Juiz de Fora, prof-ro José Passini, nuntempe instruadas Esperanton al 102 gestudentoj kaj la intereso pri nia lingvo tie kreskas pli kaj pli.

## PERNAMBUCO

● Korektenda informo: S-ino Maria José Pontes ne estas Bibliotekistino de Pernambuka Esperanto-Asocio nek gvidas elementan kaj mezgradan kursojn ĉe la sidejo, laŭ informis la numero 78 de nia Bulteno. Ŝi estas vic-kasistino en la nuna estrato de PEA kaj tiujn kursojn ŝi gvidas ĉe Pernambuka Spiritisma Federacio, laŭ klarigoj kiujn la redakcio ricevis de Amaro Pinangé Soares, inda prezidanto de PEA.

● Gravaj homoj kaj sindonaj esperantistoj konsistigas la lokan komitaton kiu zorgas pri la efektivigo de la 4-a BKE-kongreso en Olinda. Inter ili elstaras la prezidanto de la komitato, Prof-ro Jannes Markus Mabesoone, doktoro pri geologio (Universitato de Leiden, Nederlando); profesoro pri sedimentologio kaj geomorfologio, Federacia Universitato de Pernambuko; esplorsciencisto de Brazila Konsilantaro pri Esploroj kaj Teknologio; ricevis oran medalon de Brazila Geologia Asocio, 1979; aŭtoro de lernolibro pri sedimentologio kaj de plurdek fakaj studoj.

## PARÁ

● Daŭre aperadas "La Verda Papago", oficiala bulteno de klubo Esperantista Zemenhof (C. Postal 2012, BR 66000 Belém), kun tre interesa enhavo, ĉefe pri la movado en la norda regiono, kiu bezonas apongon: Amazonas E-Asocio (C. Postal 1823, 69000 - Manaús-AM), Rondonja E-Asocio (R. Antonio Cabral 219, 69300 - Boa Vista–RR), Akrea E-klubo (C.Postal 128 - 69900 - Rio Branco-AC) kaj Associação Esperantista do Maranhão (Av.Colares Moreira, Ed. Ipanema, Q.47 L.8 Ap. 303 - Renascença, 65000 - São Luiz-MA).

## RIO DE JANEIRO

● La aktora trupo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj prezentis en Rio, la 25-an de oktobro, en la Teatro Artur Azevedo, sub aŭspicio de Associação Odontológica Triângulo Carioca, la teatraĵon "La Minana Konspiro", kiu furoris en Ouro Preto, okaze de la 16-a Seminario de Esperanto.

● En ĉambro de Educandário Professores Unidos (R. Buenos Aires, 108, BR 25600 - Petrópolis-RJ) okazas ĉiuĵaŭde elementa kurso gvidadta de Prof. Délio P. de Souza kaj organizita de Petropola E-klubo.

● Aperis 2 numeroj de la bulteno AERJ, informilo de Associação Esperantista do Rio de Janeiro, kies prezidanto - Gen. D-ro Chersoneso Galvão (R. Aguiar, 36/106, BR 20261-Rio) faras kampanjon por aĉeti propran sidejon kaj preparas tutan agadplanon.

● Kolonelo Fernando José Galvão Marinho kaj d-ro Braz Cosenza akceptis partopreni la Honoran Komitaton de la 4-a Kongreso de BKE realigota en Olinda.

## SÃO PAULO

● S-ano Jorge Purgly (C. Postal 92, BR 09700-São Bernardo do Campo) verkis tre interesan folion kun la titolo "Você sabe o que é Esperanto?", per kiu li faras la tiean propagandon.

● Esta jena la nova estraro de BEJO, elekitita

en Ouro Preto: Prezidanto, José Luiz Ferreira (advokato kaj bankoficisto); vicprezidanto, Ricardo Martinez Fortes (studento pri historio); unua kasisto, Maria Antônia Ladalardo - Tuca (studentino pri Farmacio kaj Biñoemio); dua kasisto, Maria Vitória Rodrigues Travassos (ŝtatoficistino); unua sekretario, Marcelo Urbano Ferreira (studento pri Medicino kaj Historio); dua sekretario, Marcelo Whately Paiva (ĵurnalisto). La nuna sidejo de BEJO estas en São Paulo kaj jen ĝia korespondadreso: Caixa Postal 2761, CEP 01051 - São Paulo-SP).

**SANTA CATARINA**

● Ekde julio 1983 estas presita la libro Rekta Pensado, verkita de la Prof-ro Evaldo Paŭli (R. Conselheiro Mafra 176, 88000-Florianópolis). Tiu libro estas la unua de la serio Biblioteko de Filozofio Fonto, kaj estis bone vendita en la libroservo de la UK en Budapeŝto. Baldaŭ aperos lia traduko kun komentarioj de la livro de Porfírio (greka klasika aŭtoro): Enkonduko en la kategoriojn de Aristotelo.



## DONACOJ RICEVITAJ

Por subteni la eldonkoston de tiu ĉi Informa Bulteno multaj donacoj kaj abonpagoj envenis nian kason, nome:

| | |
|---|---|
| Célio Freitas Martins-RJ . . . . . | Cr$ 2.000,00 |
| Luiz de M. Cavalcanti-BA . . . . | Cr$ 1.600,00 |
| João M. Aguilera Junior-SP . . . | Cr$ 1.200,00 |
| José Bastos Campos-CE . . . . . | Cr$ 2.000,00 |
| Helmuth Schenk-SP . . . . . . . | Cr$ 2.000,00 |
| Cristovam C. Milagres-MG . . . . | Cr$ 1.200,00 |
| Maria P. Almada-SP . . . . . . . | Cr$ 1.500,00 |
| Francisco S. Almada-SP . . . . . | Cr$ 1.500,00 |
| Cláudio Zimmermann-SP . . . . | Cr$ 1.000,00 |


POMP TUR
POMPÉIA TURISMO LTDA.

pretas helpi la Esperantistojn, zorgante pri kongresaj karavanoj, turismaj ekskursoj, antaŭaĉeto de vojaĝbiletoj kaj hotelrezervoj.

AV.POMPÉIA 64, CEP 05022,

SÃO PAULO - SP - TELEX (011) 32985

ABAV-695-SP - TELs.: 65-1190/263-4616

EMBRATUR 00624 00 41 9




## EL LA NACIA GAZETARO

☆ **A CAMINHO DA LUZ** (Rua Machado de Assis 211, CEP 27180 - Volta Redonda-RJ) en sia numero de setembro 1983 publikigis tutpaĝan raporton subskribitan de Itacir Luchtemberg pri la 16-a Seminario de Esperanto, kies titolo estas: En debato, la unuiĝo de la E-movado. Kun precizeco, la aŭtoro raportis pri la klopodoj lastatempe farataj de la prezidantoj de BEL, KKE kaj BKE, cele al interkonsenta agado ne nur por la Jubileo de Esperanto, sed ankaŭ por la kunordigado kaj administrado de la movado, pere de la jam ekzistanta Nacia Esperanto-Komisiono.

☆ **AQUARIUS** (C.Psotal 112, CEP 30000-Belo Horizonte-MG), spiritualisma gazeto, publikigas artikolon de s-ano Rubens Gomes sub la titolo "O Lado Oculto do Esperanto, tio estas, La Kaŝita Flanko de Esperanto.

☆ **CORREIO FRATERNO** — Boletim de URERSC (R.Silva Cardoso 673, CEP 21810-Rio de Janeiro-RJ) havas en ĉiu numero rubrikon de s-ano Givanildo Ramos Costa.

Esperanto ne volas anstataŭi la naciajn lingvojn. Ĝia devizo estas: "Al ĉiu popolo, ĝia lingvo; al ĉiuj popoloj, Esperanto".

Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.

Legu tiun ĉi Bulteron por ke vi konu novajn faktojn; abonu por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.

Daŭran pacon ĝuas humilulo, sed en la koro de fierulo ofte regas envio kaj kolero (El La Imitado de Kristo).



## TRA LA MONDO

**ANKORAŬ PENDAS ALIĜPETO AL UEA**

★ La komitato de UEA dum siaj kunsidoj en Budapeŝto debatis pri la organiza situacio de brazilaj esperantistoj sekve de la aliĝpeto de Brazila Konsilantaro de Esperanto. La konkludo de la debatoj entenata en rezolucio unanime aprobita estas jena: "La Komitato de UEA . . . decidas prokrasti decidon pri la aliĝpeto de BKE, insiste petante ĉiujn brazilajn organizaĵojn - ikluzive de la junulara - kunfandiĝi en unu tutlandan Esperanto-organizaĵon kiel eble plej baldaŭ".

**INTERNACIA REVUO EL KOLOMBIO**

★ Aperis ANDAJ ONDOJ (Apartado Aéreo 88999, Bogotá, Kolombio), kiu havas subtitolon: Latinamerika Internacia Revuo, kaj prezentas interesajn artikolojn, precipe la historion de Esperanto en Kolombio. La provekzemplero estas maldika sed belaspekta.


**FILOZOFIA ASOCIO TUTMONDA -- FRANCUJO**

★ Per propono de la Folozofia Revuo Simpozio, fondiĝis la 31-an de aŭgusto en Budapeŝto la Filozofia Asocio Tutmonda, kies unua prezidanto tie elektita estas Prof-ro Evaldo Pauli (Rua Conselheiro Mafra 176, 88000 Florianópolis-SC).

★ FAT sin proponas ĉiujare organizi universalan simpozion de filozofio, en la kadroj de universalaj Esperanto-kongresoj. La unua okazis dum la 68-a UK en Budapeŝto, kie Prof-ro Pauli faris la poroladon pri fondo de FAT kaj prezentis ties agadplanon. La estontaj simpozioj de FAT okazos en Vankuvero (1984), Aŭgsburgo (1985), Pekino (1986 kaj Versovio (1987).

**DUA ZAMENHOF-TAGA KONFERENCO**

★ Pro la sukceso de la 1-a Zamenhof-taga konferenco pri "Monda Komunika Jaro 1983: lingvoj kaj lingvolernado", la Novjorka Oficejo de UEA kune kun Centro de Esploro kaj Dokumentado okazigos la 2-an konferencon pri "Lingvo en internaciaj organizoj", en 15-12-83. Interesiĝantoj skribu al la Novjorka Oficejo de UEA (Usono, NY 10017, New York, 777 United Nations Plaza). Prenite el la revuo UN kaj NI, 30-a numero.



## EL LETEROJ RICEVITAJ

. . . "Dankon pro via invito koncerne prelego kadre de la venonta BKE-Kongreso, tamen . . . bonvolu ne kalkuli sur min tiuokaze. Ekde nun mi jam deziras al Vi k al la tuta BKE-Estraro sukcesplenan kongreson en Olinda" (Jorge das Neves - Rio)

. . . "Refoje enhaveniĝis BKE-bulteno 78/83, plenplena de novaĵoj. Ĝi montriĝas kvazaŭ injekto de entuziasmo per ĝiaj bildoj kaj teks toj. Dankon, koran dankon." (George Otto Vaske-RS)

. . . "Mi sendas malgrandan artikolon pri nia venonta kongreso, kiun - laŭ invito de la tiea urbestro - ni okazigos en Promissão venontjare. Mi petas, ke vi ĝin aperigu venontnumere en via Bulteno — la sola vere nacia periodaĵo en nia brazila Movado" (Marcelo Urbano Ferreira Unua Skretario de BEJO - SP)

. . . "Mi ricevis vian leteron de la 15-a de Septembro, invitante min por paroli dum la BKE-Kongreso de Olinda-PE. Kvankam tre elspeza vojaĝo, mi faros tion ĝoje por Esperanto kaj por kunlabori kun nia granda prezidanto" (Prof. Evaldo Pauli - Prezidanto de Filozofia Asocio Tutmonda, el Francujo).

. . . "El tio kion mi vidis dum mia eŭropa sperto sur la Esperanta kampo, daŭre mi scias, ke kelkrilate nia brazila movado ankoraŭ estas unu el la plej bonaj (tamen plibonigendal) kaj fine, la nerefutebla pruvo pri tio, estas, ke UEA sendis D-ron Victor Sadler al Brazilo por esplori la eblecojn malfermi UEA-oficejon en nia lando" (Neima Cardoso Adôrno, eksprezidantino de BEJO-DF).

## ABONO DE TIU ĈI BULTENO

La eldonkosto kaj afranko de tiu ĉi Bulteno estas nuntempe tro granda ŝarĝo por la buĝeto de nia Asocio. Tial, ni decidis sendi ĝin senpage nur al niaj asociaj membroj. Komence de novembro 1983, la leganto ankoraŭ ne aliĝinta al BKE, sed kiu deziras daŭre ricevi la Bultenon, devas aboni ĝin, pagante jaran abonkotizon de Cr$ 1.200,00.

Ni esperas, ke la legantaro bone interpretu kaj komprenu nian decidon kaj . . . pagu la koncernan kotizonm rekte al BKE en Brazilja.

## FAKTOJ KAJ FOTOJ



La tuta estraro de BKE sin prezentis en la 16-a Seminaro de KKE en Ouro Preto: Leda, Cunha, Dorini Kaj Nelson.



Geraldo Matos, Cedilha Neto, Galvão Marinho k Enivaldo A. Silva, ĉe inaŭguro de E-ekspozicio en la ĉambro de deputitoj en Brazilja, okaze de la 3-a jarkongreso de BKE, decembro 1982.



Nia prezidanto Carlos Cunha oficas kiel UEA-komitatano, kadre de la 65-a UK de Esperanto, en Stockholm, julio 1980.

## Promissão, 84:la 6a Kongresso de BEJO atendas vin

Mi ne uzos la "puŝtridenton de l'imperativo". Mi simple diros al vi, ke BEJO kongresos en Promissão,SP, dum la lasta semajno de januaro 1984, inter la 25a kaj la 29a. Mi aldonos, ke ni sekvos la vojon malfermitan en Iporá pasintjare (5a BEJK) - t.e. kongresi en malgranda urbo, kiu stimulas la partoprenon de ĉiu kongresano. Formalaĵoj forestos, sed aliflanke multaj seriozaj diskutoj kaj amuzaj/artaj/instruaj programeroj atendas vin.

Ni tamen ne babilados sencele. La kongresa ĉeftemo, "Junuloj en la movado kaj junaj esperantistoj en la socio", certe naskos tre valorajn diskutojn kaj novajn ideojn. Pri ĝi okazos tri prelegoj kaj kvar diskutrondoj. Antaŭvidiĝas ankaŭ dumkongresaj paroligaj rondoj kaj kurso por komencantoj. Krome, la lerta E-instruisto Valdemir Moreira gvidos tutsemajnan kurson, ekde la 23a de januaro, senpagan por ĉiu kongresano.

La aliĝkotizoj estas tre malaltaj (sed atentu, ke la ĉi-subaj prezoj validas nur ĝis 30.11.83):

BEJO-ano ĝis 30-jara: Cr$ 2000; BEJO-ano pli ol 30-jara: Cr$ 3500; ne BEJO-ano ĝis 30-jara: Cr$ 3000; ne BEJO-ano pli ol 30-jara: Cr$ 4500. Tiuj kotizoj inkluzivas tranoktojn en komuna logêlo, rajton al partopreno en ĉiu kongresa programero kaj kongresan kajereton (kun adresoj de partoprenantoj kaj aliaj informoj).

La 6a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK) indas je via ĉeesto! - sed vi mem decidu. Laŭ la Manifesto de Raŭmo, ni - junaj esperantistoj -, devas montri, ke ni kapablas diri ion originalan kaj valoran al la socio. Tion kundiru kun ni, en kaj pri Esperanto! Petu aliĝilon ĉe BEJO-adreso: Caixa Postal 2761 01051 São Paulo, SP, kaj trovu vian movad-stilon en Promissão.

Marcelo Urbano Ferreira


ESCORT

ESTAMOS PRESENTES TAMBÉM NO CARRO MUNDIAL DA FORD DESEJAMOS AO ESCORT GRANDE SUCESSO

Ni estas reprezentataj ankaŭ ĉe aliaj aŭtoj per niaj: Ventolfenestroj, vitroleviloj, seruroj, ŝarniroj, pulioj, rapidumlevumiloj, pordoframoj, bufroj, pedaloj, bremsaj levumuloj, ktp.

POLLONE S.A. Indústria e Comércio

Av. D. Pedro I nº 743

Rio Grande da Serra - SP

09450

## DU SONETOJ DE JORGE DAS NEVES REVOJ CENTJARAJ

Se la fatalo iam ja permesos
nia Movado estos familio
kaj Esperanto vivos kaj progresos
sen la momentoj de melankolio.

La Fundamenton oni ne forgesos,
de Zamenhof brilegos la genio,
la tuta mondo sen maltraf' konfesos,
ke malaperis lingva utopio. . .

Ni estos fratoj, veraj homaranoj
pri kiuj sonĝis nia Geniulo
en siaj bele grandiozaj planoj.

Nia kotizo povos esti nulo
ĉar ĉiuj homoj estos "movadanoj
denaskaj", kun bonkoro, sen makulo!

## AMIKECO

*Jen fabela pejzaĝo kun vetero*
*kutime suna, blua la ĉielo*
*stelplenaj noktoj . . . Pepas ja pasero*
*en la lando de floro kaj mielo!*

*Sed l' amikeco estas la mistero*
*de la ĉarmo sur tiu grundo, celo*
*de la dioj ŝvebantaj en l' aero*
*renkonte al feliĉo kaj al belo . . .*

*Amikeco senpaga, neprograma*
*naiva, komplezema, tute pura*
*de popolo sincere tre gastama*

*Amikeco nenie pli trankvila*
*ĉar ĝi estas normale plej natura*
*en ĉiu koro vasta kaj ĝentila!*

La supra soneto Amikeco gajnis la unuan premion en la poezia konkurso "Internacia Amikeco - 1983", organizita en Italujo sub la aŭspicio de Triesta Esperanto-Asocio, kiu programis por la 6-a de novembro venonta, en sia sidejo em Trieste, imponan festpremiadon. Bedaŭrinde, D-ro Jorge das Neves, pro privataj okupoj en Rio, ne povos vojaĝi al Trieste por recevi sian honorigan premion, nek vojaĝi al Olinda, por prelegi en nia ĉi-jara kongreso.

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devas konduti unu al alia en spirito de frateco (Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, artikolo 1).

## BKE-ALIĜKOTIZO 1984

Ni sciigas al niaj legantoj kaj individuaj membroj, ke la aliĝo aŭ realiĝo al BKE por la venonta jaro fariĝos 40% pli multkosta ol la nuna jarkotizo de Cr$ 3.000,00. Tamen, la estraro decidis konservi tiun ĉi saman tarifon, kondiĉe ke la interesito anticipu la pagon ĝis 31-12-83.

La novaj aliĝintaj membroj akiras ĉiujn rajtojn en la Asocio ne nur en 1984, sed en la kuranta jarfino nem, tuj post la registro de la anticipa pago. Por fariĝi nova ano de BKE, sufiĉas sendi per ĉeko la sumon de Cr$ 3.000,00 al nia sidejo en Brazilja, kune kun informoj pri naskiĝdato, civila stato, instrunivelo, telefonnumero, kompleta nomo kaj adreso.

●●●

Ĉiu individua membro rajtas voĉdoni kaj esti voĉdonita en la asembleoj de nia Organizaĵo, partopreni nian delegitan reton, uzi la ekzistantan informan servon en Brazilja, prezenti administrajn sugestojn kaj ricevi senpage tiun ĉi Informan Bultenon.

●●●

Kun plezuro kaj danko ni informas, ke la anaro de nia Asocio kreskis pro la aliĝo de jenaj novaj individuaj membroj:

João Batista da Silva-PE, Idevalter Alecrim Pereira-BA, Aldacy de Souza Xavier-BA, Antonio Serravalle Magalhães-BA, Edgar Nunes-BA, Nelson da Costa Barreto-BA, Neusa Caldas Figueiredo-BA, Nizete Nunes da Silva-BA, Yvette Menezes Queiroz-BA, Bruno Sérgio Veras Morais-DF kaj José Bastos Campos-CE.

La amasan aliĝon de samideanoj el Bahia oni danku al la persvada laŭdinda laboro de nia Delegito en Salvador kaj kunfondinto de BKE, s-ro José Saraiva Matos.

Centro de Cópias Cerqueira Compôs e Imprimiu